

revuo

esperanto

majo 1968

61-a jaro

n-ro 750 (5)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



intervjuo: p. 66

ESPERANTO

revuo internacia

nhavo

- 65 UEA kongresos en Usono en 1972
Danke kaj gratule (Carlén)
- 66 Intervjuo kun Ivo Lapenna (Red.)
- 68 La lingva problemo en la internaciaj
organizaĵoj (citaĵoj)
- 69 Internacia normigo de lingvo-simboloj
Nekrologoj Svarc, Wheatley, Kostiainen,
Fethke, Jacobs, Reed, Herrmann, Hong
- 70 Recenzoj
Leteroj
- 71 CED
Ricevitaj eldonaĵoj
Norda Prismo
- 72 Mallonge
- 73 Grava atentigo pri la taskoj de la delegitoj
Esperanto en radio
53-a Universala Kongreso, Madrid, 1968
- 74 La Juna Vivo
- 75 Oficiala informilo n-ro 412
La internaciaj konkursoj 1968
Memoriga kalendaro

ovrila bildo

La prezidanto de UEA, prof. Ivo Lapenna, en
1968 jam 30 jarojn estrarano de la Asocio
(foto: Kehlet)

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910)

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represado de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1968): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj. Unuopa numero: 1,— gld.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en ĉ. 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx, Britujo. S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado, Postbus 412, Eindhoven, Ned.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk 1, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

D-ro Peter Zlatnar, estrarano pri kongresoj, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Germarkenstr. 146, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

La 57-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en la okcidenta-usona urbo Portland. En aŭgusto de la nuna jaro ekoficos nova direktoro de la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam. La novan plurlingvan sciencan revuon "La Monda Lingvo-Problemo" eldonos monde konata firmo Mouton & K-io (Hago-Parizo). Alta Protektanto de la Universala Kongreso en Helsinko estas la Prezidanto de la Respubliko Finnlando, s-ro Urho K. Kekkonen. UEA deklaris unu el la unuaj semajnoj de oktobro ĉiujara "Semajno de Internacia Amikeco".

Jen nur kelkaj el la punktoj tuŝitaj en la ĵus okazinta kunsido de la Estraro de UEA. Kiel ĉiujare, la 8-persona Estraro kunvenis en la Centra Oficejo de la Asocio en Rotterdam. La diskutoj daŭris tri plenajn tagojn, de la 18-a ĝis la 20-a de aprilo.

Nova direktoro de la Centra Oficejo

F-ino Vermaas, kiu en 1955 — kiam la Asocio troviĝis en kriza situacio — estis akceptinta la funkcion de direktorino de la C.O., jam delonge esprimis sian deziron retiriĝi en konvena momento, kiam troviĝos kompetenta persono por transpreni tiun taskon. En februaro de tiu ĉi jaro ŝi anoncis sian definitivon decidon forlasi la oficon, kiun ŝi okupis ekde la translokigo de la Oficejo de Britujo al Nederlando, ĉar la nuna vic-direktoro povas efike transpreni la funkcion, dum, aliflanke, ŝi ankaŭ povis prizorgi enoficigon de taŭga oficistino, el Japanujo, tiel ke la laboroj en la C.O. povos plue senĝene disvolviĝi. La Estraro akceptis la retiriĝon de f-ino Vermaas esprimante al ŝi grandan dankon pro la laboro sindone plenumita. Samtempe f-ino Vermaas akceptis la novan funkcion de Komisiito por Specialaj Taskoj (plejparte ekster la Oficejo) kaj tiel restos ligita al la laboroj de la Asocio. La Estraro nomis d-ron Sadler nova direktoro de la Centra Oficejo kaj esprimis al li bondezirojn por sukcesa laboro.

En 1972: Portland, Oregon, Usono. Jen la adreso de la 57-a UK. La kongresejo estas la Hotelo Hilton en Portland, urbo de 400 000 loĝantoj ĉirkaŭ mil kilometrojn norde de San Francisco. Kiel por Tokio kaj Tel Aviv, tiel

ankaŭ por Portland la Estraro decidis jam tre frue por ebligi al la kongresanoj plani sian vojaĝon kiel eble plej bone. La financaj kondiĉoj estos escepte favoraj.

Por la kongresoj de 1970 kaj 1971 la Estraro diskutis kelkajn eblecojn, sed ne faris finan decidon. Aliflanke, ĝi definitive decidis aranĝi postkongresan ekskurson al Leningrad post la venontjara kongreso en Helsinko. La kunveno ankaŭ fiksas la programon de la Madrida kongreso — vidu p. 73.

Mouton kaj La Monda Lingvo-Problemo

La nova plurlingva revuo "La Monda Lingvo-Problemo", lanĉota en decembro, aperos ĉe la monde konata scienca eldonejo Mouton & K-io, sub aŭspicio de CED. La Estraro krome decidis eldoni en 1969 aŭ 1970 aŭtomobilan terminaron, apogi la eldonon de Plena Ilustrita Vortaro kaj akcepti la Koranon en la Serion Oriento-Okcidento.

La rezultoj pri 1967 montras, ke la spezoj de la Asocio estis ekvilibrataj. La Estraro notis kun kontento plurajn pozitivajn signojn: ke la eldonado de "La Praktiko" ne plu donas deficiton, ke la membronombro verŝajne montras kreskon en la fino de 1968, ke la aperado de "Kontakto" fine reguliĝas... Entute: helaj perspektivoj en nia 60-a jaro.

DANKE KAJ GRATULE

Ci-jare, kiel konate, ni festas la 60-jaran ekzistadon de Universala Esperanto-Asocio. Sed samtempe ni havas ankaŭ aliajn kaŭzojn por festi. La prezidanto de UEA, profesoro Ivo Lapenna, apartenas al la Estraro de UEA jam 30 jarojn. Li do estis estrarano dum la duono de la ekzistado de la Asocio. Plie, jam 40 jarojn li parolas la Internacian Lingvon.

Ni povas esti feliĉaj en la tuta Esperanta movado, ke ĝia plej grava organizaĵo havas tian eminentan prezidanton. Liaj altaj universitataj kvalifikoj kaj oficoj same kiel lia personeco, lia multlingveco kaj lia supera oratora kapablo donas prestiĝon al UEA kaj al nia movado. Jam dum kelkaj jaroj mi havis la favoron kunlabori kun li. Ofte mi miris pri lia supera inteligento kaj grandega preskaŭ senlaca laborkapablo kaj laboremo. Ĉio tio certigas al la movado kompetentan gvidadon.

Laŭsperte mi scias, ke ofte unuj homoj pro envio suspektigas, primensogas, eĉ persekutas personojn, kiuj estas pli naturdotitaj kaj kiuj vere volas ion fari. Ivo Lapenna ne estas escepto el la regulo. Oni nomis lin jen komunisto jen burĝa reakciulo. Oni asertis, ke li estas terura diktatoro k.t.p. Oni ne nur uzis tiajn mensogojn sed ankaŭ emfazis pri persona kulto en la movado. Kion mi ĉi tie skribas pri profesoro Lapenna ne fontas el personokulto aŭ admirado blinda. Mi nur volas ĉe tiu ĉi duobla jubileo esprimi mian sinceran, elkoran dankon al kolego kaj amiko, kiu fidele tra ŝtormoj kaj kalumnioj faris pli, ol ni aliaj. Mi faras tion sciante, ke miloj kaj miloj da esperantistoj en la tuta mondo danke konsentas kaj kune kun mi gratulas al UEA pro granda homo donita al ĝi.

Erik Carlén

espera
majo 1

INTERVJUO KUN IVO LAPENNA

Universala Esperanto-Asocio atingis en ĉi tiu jaro la respektindan aĝon de 60 jaroj. Dum precize la duono de tiu tempo – 30 jaroj – la nuna prezidanto de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna, apartenis al la Estraro de la Asocio. Partoprenante dum tri jardekoj la gvidadon de UEA, li lasis sur ĝi la firman stampon de sia krea energio, scienca labormetodo kaj humaneca spirito. Venis do momento perfekte konvena por peti de li kelkajn perspektivajn ekrigardojn al la evoluo de UEA kaj de la tuta internacilingva movado.

Sed koincidas ankaŭ pli persona fest-okazo: en 1928 – do ĝuste antaŭ 40 jaroj – Ivo Lapenna, tiam studento de la Universitato de Zagreb, eklernis tiun lingvon Esperanto, kiu poste fariĝis tiel esenca parto de lia kulturo. Ankaŭ por kelkaj pli personaj demandoj, do, la momento estas oportuna.

Profesoro Lapenna — tutunue, plej koran gratulon pro la duobla datreveno! Por komenci, mi volus tuŝi la demandon de la lingva problemo ĝenerale. Oni foje renkontas personojn, kiuj bagateligas la lingvan problemon aŭ supozas, ke ĝin solvis jam aŭ solvos tuj la teknika evoluo. Via tezo, aliflanke, ĉiam estis, ke la monda evoluo ĉiam pli akriĝas la lingvan problemon kaj ĉiam pli favoras tiun solvon, kiun ni mem aplikas. Sur kio vi bazas tiun tezon?

La tezo estas bazita sur pluraj nekontesteblaj faktoj, el kiuj mi mencias nur la plej fundamentan.

La grandegaj progresoj farataj en ĉiuj branĉoj de la scienco kaj tekniko, kaj akompanataj de amaso da novaj inventoj, malkovroj kaj en multaj kazoj vere epokfaraj atingoj, postulas kaj ebligas konsiderindan vastiĝon de internaciaj kontaktoj sur ĉiuj niveloj kaj en ĉiuj sferoj. Aliflanke, diversaj malnoviĝintaj politikaj institucioj kun profundaj radikoj en la 19-a jarcento kaj kelkaj alispecaj obstakloj, inkluzive la lingvodiversecon, grave malhelpas tiun normalan disvolviĝon de interhomaj rilatoj. En tia situacio la plej fortaj potencoj, ekspluatante la kreskantan bezonon de internacia komunikado por siaj egoismaj politikaj celoj kaj aliaj avantaĝoj, komencis altrudadi ĉiam pli impete siajn naciajn lingvojn kaj pretendadi por ili la pozicion de "oficialaj" aŭ "laboraj". En la komenco, tuj post la Dua Mondmilito, la malpli fortaj rezignacie kliniĝis kaj akceptis, sed tre baldaŭ, kiel oni povis atendi, venis la reago. En la rapide ŝanĝiĝantaj rilatoj de la politikaj fortoj en la mondo iuj potencoj fariĝas malpli gravaj, dum aliaj ekludas novajn rolojn kaj povas pli efike aŭdigi siajn voĉojn ankaŭ koncerne la lingvan demandon. Rezulte, en nuraj dudek tri jaroj ekde la finiĝo de la milito la nombro de "oficialaj" kaj "laboraj" lingvoj en diversaj interŝtataj kaj privataj internaciaj organizaĵoj konsiderinde kreskis, la batalo sur la lingva kampo akriĝis, kaj la lingva problemo ne nur ne estas solvita, sed, kontraŭe, ĉiam pli komplikigas. Ankaŭ interne de plurnaciaj ŝtatoj okazas adekvata duobla procezo: unuflanke altrudado de tutŝtataj lingvoj favore al la plej forta nacio, aliflanke rezisto de la malpli

grandaj nacioj kaj de naciaj malplimultoj kun la celo konservi la propran nacian identecon. La antagonismo inter la neceso de internaciaj kunlaborado kaj komunikado, unuflanke, kaj la ekzistorajto de nacioj, naciaj kulturoj kaj naciaj lingvoj, aliflanke, povas esti fine solvita nur per la sintezo, kiun prezentas la Internacia Lingvo kiel plene taŭga instrumento de internacia komunikado kaj, samtempe, efika rimedo por protekti la malpli grandajn naciojn kaj iliajn lingvojn kontraŭ la lingva imperiismo de la plej potencaj. La ŝtala logiko de la skizita evoluprocezo devige kondukas al la solvo, kiun ni praktikas. Neniu povas profeti, kiam precize tio okazos, sed mi estas konvinkita, ke iam, eble eĉ baldaŭ, ĝi certe okazos.

Kiel konate, UEA decidis utiligi la Jaron de Homaj Rajtoj por lanĉi kampanjon "Por la Internacia Lingvo, kontraŭ lingva diskriminacio". Ĉu temas pri unufoja afero, aŭ ĉu oni rajtas paroli pri nova — pli ataka — strategio en la daŭra laboro de UEA?

La kampanjo, tute nature, estas aparte intensa en tiu ĉi Jaro de la Homaj Rajtoj. UEA — kio signifas: ni ĉiuj, kiuj apartenas al ĝi — faras sian eblon por atentigi vaste pri la lingva diskriminacio, ĉar ĝuste tiu formo de diskriminacio estas malmulte rimarkata, kvankam ne malofte ĝi transformiĝas en veran kulturan genocidon. Tamen, estas apenaŭ imageble, ke en unu sola jaro ni povus eĉ nur parte atingi la celon. Tial mi opinias, ke UEA devos daŭrigi la kampanjon kaj aldoni ĝin kiel plian konstantan eron en la ampleksa programo de multdirektaj agadoj.

En 1966 vi gvidis la delegacion de UEA, kiu transdonis ĉe la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj la amase apogitan Proponon por radikala solvo de la lingva problemo. Certe tre multaj el niaj legantoj restis senkomprenaj antaŭ la posta sinteno de la Sekretariato kaj apenaŭ povas kredi, ke tiel nur finiĝis afero, al kiu donis sian skriban apogon eĉ pluraj ŝtatestroj. Ĉu vere la afero finiĝis?

La afero neniel finiĝis. Pro diversaj kaŭzoj, kiujn mi ne povas prezenti ĉi tie, ni provizore haltigis la premon. La Propono estis oficiale

transdonita al la Sekretariato, kaj nun ĝi troviĝas tie. Ĝi estas nek rifuzita, nek akceptita. En kiu ajn momento kiu ajn ŝtato povas postuli, ke la afero estu metita en la tagordon. La afero, laŭ mi, ne urĝas, precipe ne en la nuna situacio, kiam UN estas interne disŝirata kaj havas multege da zorgoj. En ĉiu okazo, la Propono povas plue esti utiligata kiel signo de amasa pledo por la solvo de la lingva problemo per Esperanto.

Dum via tuta agado por Esperanto vi ĉiam strebis altigi la prestiĝon de la lingvo kaj movado ĉe la publiko kaj ĉe publikaj instancoj. Kion vi opinias ankoraŭ farebla por akiro de pli alta prestiĝo?

Daŭrigi kaj intensigi ĉiujn nunajn agadojn, kaj diskonigi ilin multe pli ol ĝis nun. La prestiĝo de la Internacia Lingvo kaj de UEA estas hodiaŭ sendube multe pli alta ol antaŭ kelkaj jaroj, sed en tre multaj landoj kaj en decidaj medioj ĝi ankoraŭ ne estas tia, kia ĝi devus kaj povus esti kompare kun la objektive elstaraj atingoj de la lingvo kaj la laboro de UEA. La prestiĝo de la lingvo kaj de UEA multe kreskos, se nia tuta informa aparato, precipe la landaj kaj lokaj informaj fakoj, sukcesos informi la mondon, unuavice la ŝlosilajn poziciojn de la publika vivo, pri objektivaj faktoj rilate la nunan staton de la Internacia Lingvo. Tio pli ol sufiĉas. Troigoj, bluoj kaj fantaziaj ciferoj povas nur malutili kaj efektive jam multe ĝenis. Plue, necesas nombre fortikigi la Asocion. Nia komuna celo devas esti, ke ĉiu sciinto de la lingvo restu aŭ fariĝu Membro-Abonanto de UEA. Tio per si mem plue altigos la prestiĝon de la Asocio kaj, krome, siavice ebligas grandigi la revuon, ampleksigi la agadojn, fortikigi la poziciojn de Esperanto en la mondo. En tiu nuna interna kampanjo de UEA ĉiu povas helpi per objektiva diskonigo de la laboro de la Asocio kaj per instigado al tuja aliĝo.

En la lastaj antaŭmilitaj jaroj kaj denove antaŭ kelkaj jaroj UEA dediĉis multe da klopodoj al la ideo de interŝtata konvencio pri la instruado de Esperanto en lernejoj. Kiel aspektas al vi nuntempe la ŝancoj por realigo de tia konvencio?

Pro la akriĝo de la lingva problemo la ŝancoj fariĝas ĉiam pli favoraj. La Konsulta Komisiono pri Lernejoj atente sekvas la evoluon. En konvena momento UEA certe renovigos la klopodojn.

Superrigardante la tutan 60-jaran evoluon de UEA, kiujn okazaĵojn vi distingas kiel la verajn "mejloŝtonojn" por la Asocio?

Laŭ mi, la veraj "mejloŝtonoj" estis: la fina solvo de la t.n. organiza demando kaj la forigo de "dueco" en 1947; la ŝanĝo de la Statuto, akcepto de la unua Baza Laborplano de UEA en 1955 kaj la translokiĝo de la sidejo al

Rotterdam en la sama jaro. Precipe la lasta "mejloŝtono", kiu siatempe kaŭzis kontraŭstaron kaj multajn diskutojn, ebligis multajn novajn iniciatojn, duobligon de la membro-nombro kaj ĝeneralan ekfloron, neniam spertitajn antaŭe.

Multajn branĉojn de sia nuntempa agado UEA ŝuldas al via propra iniciato. Ni pensu nur pri CED, ISU, Belartaj kaj Oratora Konkursoj, Kongresa kaj Internacia Gazetaraj Servoj kaj Informa Fakoj, Konsulta Komisiono pri Lernejoj... por ne menciigi plurajn aliajn ankoraŭ. Per kiuj agadoj aŭ instancoj UEA devus plue vastigi sian laboron, laŭ via opinio?

Unue mi deziras emfazi, ke diversaj "branĉoj", kiuj ankoraŭ nun bonege funkcias — ekzemple la delegita reto kaj la Jarlibro — estis establita en la momento mem de la fondiĝo de UEA; aliaj — ekzemple la klopodoj en la lernejoj aŭ la agadoj ĉe internaciaj organizaĵoj (Ligo de Nacioj) — estis entreprenitaj jam pli frue, kaj la laboro en tiuj sferoj estas certgrade daŭrigo de la antaŭaj, sed, kompreneble, laŭ novaj metodoj en novaj cirkonstancoj; fine, la agadoj menciitaj de vi ja ŝuldiĝas al miaj iniciatoj, sed tiuj iniciatoj povis esti realigitaj nur dank' al komprenemo kaj sindona helpo de multaj kunlaborantoj ĉie tra la mondo. Nun al la respondo: aldone al la menciitaj kaj ĉiuj aliaj nunaj agadoj de UEA, CED komencos eldonadi en decembro novan revuon "La Monda Lingvo-Problemo", pri kiu la legantaro jam estas informita. Tiu altnivela revuo, en kiu kunlaboros alte kvalifikitaj specialistoj sub via kompetenta ĉefredaktoreco, objektive pritraktos la temaron kaj certe sukcesos detrui multajn antaŭjuĝojn. La artikoloj kaj informoj povos esti sukcese utiligataj de kunlaborantoj ankaŭ por dokumenti proponojn en ligo kun la Internacia Lingvo ĉe landaj instancoj. Plua vastigo de la laboro estus ebla nur se ni povus havi pli da oficistoj en la C.O., kiuj kompetente kaj profesie dediĉos sin al la laboro por Esperanto, kaj tion, siavice, povas ebligi nur amasa aliĝado al UEA en la kategorio MA.

Se vi retrorigardas trans 30 jarojn al la tempo, kiam vi unuafoje laboris en la Estraro de UEA, en kiuj aspektoj la tiama situacio plej forte kontrastas kun la nuna?

Efektive, kiam mi estis elektita kiel estrarano dum la Londona Kongreso en 1938, ekzistis UEA kun sidejo en Genevo kaj Internacia Esperanto-Ligo kun sidejo en Herons-gate. Nur en 1948 la du organizaĵoj kunfandiĝis sub la tradicia nomo de Universala Esperanto-Asocio. La ĉefa diferenco inter la tiama situacio kaj la nuna estas, ke en tiu tempo, parte pro la krizo de "dueco", UEA en Genevo apenaŭ vivetis, dum IEL, kies estrarano mi estis, dediĉis sian ĉefan atenton al la eldonado de la revuo kaj de la Jarlibro kaj al organizado de la kongresoj; nuntempe UEA

tervjuo kun Ivo Lapenna (daŭrigo)

laboras laŭplane kaj samtempe realigas tutan aron da paralelaj agadoj, kiuj apogas unu la alian kaj antaŭenigas la tuton. Sufiĉas tralegi la ĉiujaran Raporton de la Estraro por konstati la amplekson kaj multflankecon.

El ĉiuj viaj atingoj en la Esperanto-movado, kiun vi mem taksas la plej grava kaj plej daŭre valora? Kaj el la celoj ankoraŭ ne atingitaj, kiun vi plej dezirus ankoraŭ mem efektivigi?

Verŝajne unu el la plej gravaj eksteraj atingoj estis la konata Rezolucio de Unesko, kaj interne la fondo kaj evoluigo de CED, sed mi mem rigardas mian laboron por la Internacia Lingvo kaj por UEA kiel multifacetan tuton, en kiu neniu ero estas disigebla de la alia. Sincere parolante, mi ne opinias, ke mia siatempa laboro en la Akademia Esperanto-Klubo en Zagreb, aŭ mia agado kiel estrarano kaj poste kiel prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo, estis malpli gravaj ol mia laboro en la Komitato kaj Estraro de UEA. Guste tial mi alte aprezas la laboron, kiun faras niaj homoj en la lokaj grupoj kaj en la landaj aŭ fakaj organizaĵoj. — Kion mi dezirus ankoraŭ efektivigi? Multon. Sed mi estus pli ol kontenta, se antaŭ la Kongreso en Madrid UEA povus havi almenaŭ 9 000 individuajn membrojn.

Kiel verkisto vi publikigis librojn jam en pluraj lingvoj. Certe interesas la legantojn ion ekscii pri via plej nova verko jura. Kaj pri eventuala tria eldono de "Retoriko"?

La nova verko pritraktas la sovetan kriminaljuran politikon. Verŝajne ĝi aperos en tiu ĉi jaro. La manuskripto jam troviĝas ĉe la eldonisto. En la nuna momento mi ne planas la trian eldonon de "Retoriko". Post la elĉerpigo de la nuna "Elektitaj Paroladoj" verŝajne aperos la tria eldono de "Retoriko". Intertempe estus tre necese komplete reverki la libron "La Internacia Lingvo — Faktoj pri Esperanto", kies unua eldono jam delonge disvendiĝis. Mi esperas, ke kun via helpo ni povos sufiĉe baldaŭ realigi tiun ideon.

Krom Esperanto, vi parolas denaske la kroatan, prelegas al viaj studentoj en la angla kaj uzas ankoraŭ plurajn aliajn lingvojn. Kian personan, afekcian signifon havas por vi la diversaj lingvoj?

Tri lingvojn mi sentas kiel "miajn": la lokan dalmatan dialekton, la kroatan literaturan lingvon kaj la Internacian Lingvon. La aliajn lingvojn mi plue bedaŭrinde sentas kiel pli aŭ malpli fremdajn, kio neniel signifas, ke mi en kiu ajn senco malŝatus aŭ subtaksus ilin. El vidpunkto de afekcia signifo la tri menciitaj lingvoj estas al mi same karaj.

Kiel persono rigardata kiel lingva modelo i.a. pro la internacia elparolo kaj plene natura fluo de la vortoj, kiajn rimedojn vi rekomendus al tiuj, kiuj bezonas ankoraŭ perfektigi en la aktiva lingvo-uzo?

Por perfektigi en la aktiva lingvo-uzo ekzistas nur unu rimedo: legi literaturon kaj aliajn tekstojn, verkitajn en perfekta Esperanto (ankaŭ tiurilate la periodaĵoj de UEA sendube estas rekomendindaj); aŭskulti la lingvon kiel eble plej ofte (radio-elsendoj, gramofondiskoj, sonbendoj, kunvenoj de la lokaj grupoj); mem paroli ĝin.

★

En la fino mi deziras plej kore danki al ĉiuj, kiuj dum 40 jaroj de mia laboro por Esperanto kaj 30 jaroj en la Estraro de UEA en kiu ajn formo kunlaboris kaj helpis al progresigo de la Internacia Lingvo kaj al fortikigo de Universala Esperanto-Asocio. Mi fidis, ke per harmonia kaj amika kunlaborado surbaze de la akceptitaj laborprogramoj ni povas ankoraŭ multon atingi ne en la malproksima estonteco, sed jam nun. Mi estas ankaŭ pli ol konvinkita, ke sole UEA kun ĝia nuna strukturo kaj interna demokrata maŝinaro povas sukcese konduki la Internacian Lingvon al pliaj sukcesoj ĝis la fina ĝeneraliĝo de ĝia uzo.

Dankon.

ioj

LA LINGVA PROBLEMO EN LA INTERNACIAJ ORGANIZAĴOJ

"Die Welt", Hamburg, raportis pri la 5-a Kongreso de la Internacia Federacio de Tradukistoj, en Finnlando: "En Lahti iu povus provi per dek ses lingvoj mendi ekster la kongresejo glason da lakto — li tamen ne sukcesus. La tradukistoj, kiuj regis ofte plurajn lingvojn sed ne la finnan, devis kontentigi sin per gesto-lingvo. Tiel okazis ankaŭ, ke al tradukistino, kiu volis aĉeti banoĉapon, oni en la magazeno proponis naĝ-basenon".

Lingua, Amsterdam, feb. 1968 (en raporto pri la Dek Internacia Kongreso de Lingvistoj): "...la ĉeesto de granda nombro da rusaj sciencistoj estis feliĉiga. Tamen, ĉar multaj el ili prelegis en la rusa lingvo, ili perdis unikan okazon pli bone konatigi siajn ideojn inter okcidentaj lingvistoj."

Nieuwe Rotterdamse Courant, 19.12.67: "Kiam la prezidanto de la Ĝenerala Asembleo de UN, la rumano Manescu, kaj la ĝenerala sekretario U Thant interparolas, ili uzas interpretiston. Manescu parolas la francan, sed ne la anglan; U Thant parolas la anglan, sed ne la francan."

eranto
o 1968

En februaro alvenis la unua ekzemplero de jena eldonaĵo:

ISO Recommendation R 639. Symbols for Languages, Countries and Authorities. November 1967. (Rekomendo R 639 de la Internacia Organizaĵo por Normigo. Simboloj por Lingvoj, Landoj kaj Aŭtoritatoj.)

Tiu broŝuro, enhavanta 16 paĝojn grandformatajn, aperis samtempe en la lingvoj angla, franca kaj rusa. La naciaj organizaĵoj por normigo publikigos naciajn normojn sur la bazo de tiu internacia Rekomendo. Germanlingva adaptaĵo, ekzemple, jam aperis en la revuo "DIN-Mitteilungen" 1965, paĝoj 547-558. Detala artikolo germanlingva pri la principoj sekvitaj ĵus aperis en la revuo "Lebende Sprachen" (Langenscheidt, Berlin); angla tradukaĵo aperos en la revuo "Babel", organo de la Internacia Federacio de Tradukistoj (FIT).

La ĵus akceptita Rekomendo estas komparebla al la internacia konvencio pri la simboloj de landoj, uzataj sur motorveturiloj kaj por aliaj celoj (ankaŭ kiel aldonaĵoj al la lingvosimboloj de ISO). La diskutoj en ISO daŭris de 1951 ĝis 1967. La Rekomendo estas akceptita de 24 landoj.

Ĝi enhavas simbolojn por 37 lingvoj. Plej

malfacile estis, trovi akordon por la lingvoj angla kaj hispana. La fina voĉdonado rezultiĝis E kaj S. Por Esperanto oni fiksis Eo. (Historiaj detaloj estas troveblaj en la artikolo WÜSTER: La internaciaj simboloj de lingvoj, en "Sciencaj Studoj", Kopenhago 1958.)

Ci-sube sekvas la kompleta listo. Kiel oni vidas, por kelkaj lingvoj la uzantoj povas libere elekti inter formoj unulitera kaj du-litera. Plej kurioza estas la inkluzivo de du projektoj de internacia lingvo, kiuj apenaŭ gajnis adeptojn (Interlingue, Interlingua), dum, aliflanke, grandaj lingvoj kiel la tamila kaj bengala, kun dekoj da milionoj da parolantoj kaj tre riĉaj literaturoj, eĉ ne aperas.

Afrikanas: Af. Angla: E, En. Araba: Ar. Bulgara: Bg. Ĉeĥa: Cs. Ĉina: C, Ch. Dana: Da. Esperanto: Eo. Finna: Fi. Franca: F, Fr. Germana: D, De. Greka: G, Gr. Hebrea: He. India: Hi. Hispana: S, Sp, Es. Hungara: Hu. Indonezia: In. Interlingua: Ia. Interlingue (Occidental): Ie. Itala: I, It. Japano: J, Ja. Korea: Ko. Latina: L, La. Nederlanda: Nl. Norvega: No. Pola: Pl. Portugala: Pt. Rumana: Ro. Rusa: R, Ru. Sanskrita: Sa. Serbokroata: Sh. Slovaka: Sk. Slovena: Sn. Sveda: Sv. Turka: Tr. Ukraina: Uk. Urduo: Ur.

NEKROLOGOJ

TEODORO ŠVARC

La 22-an de februaro mortis en sia Nov-Jorka hejmo d-ro Teodoro Švarc, aŭtoro de "Modernaj Robinzonoj" (1923) kaj "Maskerado ĉirkaŭ la morto" (1965). Li estis 74-jara. Hungaro (lia tiulanda nomo estis Tivadar Soros), li fondis la revuon Literatura Mondo en 1922 kaj restis ligita al ĝi kiel eldonisto-redaktoro ĝis 1924.

EVELYN M. WHEATLEY

Fino Evelyn M. Wheatley mortis la 6-an de marto 1968 en Birmingham, Britujo, kie ŝi estis la delegito de UEA. Ŝi multe laboris por BEA, kies prezidanto ŝi estis de 1962 ĝis 1966. Kiel profesia instruistino ŝi dum unu jaro eksperimente instruis per Esperanto en finnlanda lernejo.

V. J. KOSTIAINEN (1889-1968)

La 22-an de marto mortis en Finnlando s-ro V. J. Kostiainen, komitatano de UEA de post 1964 kaj delegito en Hämeenlinna de post 1945. Siatempo li estis sekretario de Laborista Sporta Asocio de Finnlando kaj estrarano de Socialista Sport-internacio.

STEFAN FETHKE

En Varsovio mortis pioniro Stefan Fethke, 66-jara, la plej aĝa el la tri fratoj Fethke, el kiu la meza konatiĝis sub la verkista nomo Jean Forge.

B. JACOBS-VAN DER STEGEN

La 27-an de februaro forpasis 80-jara s-ino B. Jacobs, edzino de la belga pioniro Jan Jacobs.

IVY KELLERMAN REED (1877-1968)

La 6-an de februaro mortis la usona pionirino d-rino Ivy Kellerman Reed. Ŝi lernis la lingvon jam en 1905 kaj verkis lernolibron kaj tradukojn de "Kiel plaĉas al vi" (Shakespeare) kaj "La Reĝo de la Ora Rivero" (Ruskin).

WILHELM HERRMANN

Subite forpasis pro apopleksio la 21-an de marto 1968 d-ro Wilhelm Herrmann. D-ro Herrmann fariĝis komitatano de UEA en 1954 kaj restis tia ĝis la morto. De 1956 ĝis 1962 li estis estrarano de UEA kaj de 1961 ĝis 1967 prezidanto de Germana Esperanto-Asocio. Liaj apartaj interesoj estis la Eŭropa Kampanjo, kiun komisiis al li UEA ekde 1956, kaj la manuskripta Germana Antologio. Antaŭ la emeritiĝo li direktis distriktan tribunalon en Germanujo.

HENGWI HONG (1911-1968)

La 11-an de marto subite mortis pro korparalizo prof. Hengwi Hong, delegito de UEA en Taegu. Li estis profesoro pri sociologio kaj pri Esperanto en la Universitato Chung-gu, Taegu, de post 1948, kaj i.a. prezidanto de Korea Esperanto-Instituto 1956-1963. Li verkis kaj aperigis vortaron kaj lernolibron de Esperanto por koreoj.



W. Herrmann



Hengwi Hong

Mondmapo, ellaborita laŭ decidoj de Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj. Red. Tibor Sekelj. Eld. IOE (Beograd), 1968. 98 x 70 cm., faldita. Plurkolora presita, papera. 5000 ekz. 3,80 gld.*

Pri la mapo mem kiel kartografia produkto ni ne povus diri ion apartan. Ĝenerale la impresado estas bona. Konsidere al ĝiaj dimensioj kaj al ĝia celo ni ne atendas trovi en ĝi detalajn donacojn.

La konsisto de la Komisiono (G. Waringhien, T. Sekelj, J. M. Mabesoone, D. L. Armand, M. C. Butler, F. Faulhaber, C. Stöp-Bowitz, A. Thomson) imponas kaj permesas atendi kompetentan solvon de kelkaj malfacilaj problemoj lige kun geografiaj nomoj. En "Deklaro" la laborintoj avertas, ke la proponataj nomoj "ne estas konsekvencaj laŭ iu regula skemo, sed liberaj individuaj unuoj kiel nomoj de personoj, montoj, objektoj".

Tiu ĉi "nekonsekvenceco" efektive rimarkigas ĉe la landnomoj (kaj lige kun tio ankaŭ la nomoj de nacioj), pri kiuj ni rajtas serĉi principan bazon kaj klaran sistemon. Pri Eŭropo la landnomoj plejparte sekvas la klasikan fundamentan manieron per sufiksoj, escepte de landoj kiel Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio (tamen Serbujo ktp.), Sovetio (tamen Rusujo ktp., sed Ukraino, Azerbajĝano), plue: Nederlando, Islando — tamen (strange kaj nekompreneble kial) Finnuloj; plue: Eŭro, Malto, Andoro, Luksemburgo (kun ĉefurbo stranga

Luksemburgurbo!), k.a. En Azio: Afganujo, Ĉinujo, Hindujo, Japanujo, Mongolujo, Turkujo, la ceteraj sen iu sufikso (pridiskutendaj estas Koreo, Vjetnamo, Israelo). En Afriko: Egiptujo, Malagaŝujo, la ceteraj sen sufikso. En Ameriko: ĉiuj nomoj sen sufikso (pripenŝenda estas tamen Meksiko — Meksikurbo). En Oceanio (kaj Aŭstralio) — ĉiuj nomoj sen sufikso.

Agnoskante, ke la tiel proponata solvo ne estas senripoĉa, la Komisiono tamen (en la "Deklaro") "petas la redaktorojn de la Esperanta gazetararo, verkistojn kaj ĉiujn aliajn esperantistojn PRAKTIKE UZI la donitajn nomojn (sen alternativo), kaj post 3-4-jara uzo voki ĝian atenton al tiuj, kiuj estas praktike neuzablaj kaj tial nepre korektendaj."

Prova uzado dum 3 aŭ eĉ 4 jaroj — longa periodo. Kelkaj neperfektaĵoj estas jam nun vidataj kaj korektendaj senprokraste, konsidere al fakta kaj jam stabiligita praktikado. Mi, ekzemple, forte dubas, ĉu "Esperanta Finnlando" konsentos transbaptiĝi "Esp. Finnuloj", ĉu la vjetnamoj komencos nomi sin vjetnamanoj, la ukrainoj — ukrainanoj ktp. La nuna MONDMAPO estu ekira punkto por reguligi la aferon pri la landnomoj sur bazo de plej vasta diskutado kun nepra partopreno de reprezentantoj de ĉiuj interesataj nacioj, kies opinioj ni ne rajtas neglekti.

A. D. Atanasov
(Sofio)

roj

POŝTKARTO SUFIĈAS

Mi sendis poŝtkarton al la franclingvaj servoj de BBC kun la demando: "Kia estas la situacio de Esperanto en Britujo?". La rezulto estis dufoja disaŭdigo de 5-minuta respondo la 15-an kaj 21-an de januaro (vidu "Esperanto" p. 41). Similan demandon pri Germanujo mi sendis al la franclingvaj servoj de Deutschlandfunk, kiu dufoje menciis Esperanton kaj GEA.

L. Giloteaux,
Croix, Francujo, 17 mar 68

KIU FONDIS "ESPERANTO"?

Sur la interna paĝo de la kovrilo de nia "Esperanto - revuo internacia" oni povas legi: "Fondita en 1904 de H. Hodler". Tio estas eraro. Fondis la gazeton en 1905 s-ro Paul Berthelot (1883-1910), franco. Post dujara baraktado li transdonis ĝin en 1907 al H. Hodler, kiu redaktis kaj eldonis ĝin de 1907 ĝis 1920. Dum 15 jaroj Hodler estis posedanto kaj redaktoro. Per letero, iom antaŭ sia morto, Hodler donacis "Esperanto" al UEA.

Alfred Rehmann
Genevo, 18 mar 68

Dankon pro la prava atentigo. Ni jam korektas la indikon. - Red.

Kajin-maru, novelo de Nogami jaeko. El la japana tr. Osaki kazuo. Dua eld. Japano Esperanto-Instituto, Tokio, 1966. 76 p. 18 x 13 cm., frontispico. 2,40 gld.*

Tiu ĉi novelo, ĉefverko de la aŭtorino, estis publikigita en 1922 kaj aperis en Esperanta traduko unuafoje jam antaŭ tridek jaroj. La forta rakonto de Nogami jaeko atestas pri la progreseco de la modern-japana verkistino.

La enhavo turniĝas ĉirkaŭ kvar maristoj, ŝipanoj de Kajin-maru, pro fortega ŝtormo duon-detruita kaj dum kelkaj dekoj da tagoj fordrivanta de la hejmlando al la senlima kaj senhoma oceano. En la karakteroj de la roluloj kombiniĝas orienteca intimiĝo kun la antaŭvidata morto kun aliflanke egoisma lukto por ĝisvivo, kies trista kulmino estas murdo de unu ŝipano.

La lingvaĵo estas bona; la senkomplika stilo de la tradukinto faciligas la legadon. Detala glosaro de japanaj terminoj kaj esprimoj kompletigas tiun ĉi salutindan aldonon al la fluo de literaturaĵoj, kiu atingas nin el Japanujo.

Wim Jansen (Nederlando)

KONDIĈOJ DE RECENZOJ

La revuo "Esperanto" principe recenzas ĉiujn duope ricevitajn novajn librojn, broŝurojn kaj diskojn. Unuope ricevitajn, kiel ankaŭ politikajn aŭ religiajn eldonaĵojn, ĝi nur mencias. Nepetitaj recenzoj ne aperas.

Korespondu! letermodeloj de V. Benczik. Eld. Hungara Esperanto-Junularo, 1967. 15 p. 14 x 10 cm., 0,30 gld. (1,2 st.)*

Generale la unuaj interamikaj kontaktoj de komencantaj esperantistoj estas perleteraj. La "Letermodeloj" de Benczik en formo de historieto bone servas por ekzerciĝi en la uzado de de plej kutimaj frazoj kaj vortoj. La lingvo estas senerara, la stilo bona.

Detlev Blanke (Germanujo)

NORDA PRISMO

Post necesa reorganizo plej baldaŭ aperos el Danujo Memora numero pri Ferenc Szilágyi. Kun la numero estos la oficiala dana publikaĵo Danio en bildoj. Neabonantoj povas mendi per alsendo de 5 int. resp. kuponoj aŭ 7 steloj = 3.50 d.kr. ĉe la administranto, E. J. Frost, Ved Fortunen 16, Lyngby, Danujo, ĝirkonto 90.555.

N.B. - Ĉi tiu lasta adreso, en Danujo, estas la sola funkcia por la administrado. Oni do nepre nenion plu sendu al la antaŭa adreso en Skövde.

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Vojaĝi tra Hispanio estas facile. Eld. RENFE, (1968). 40 p. 21 x 15 cm., ilustr. Senpaga.*

Malfermita letero al la Prezidanto de la Akademio, de H. A. de Hoog. Eld. la aŭtoro, Archimedesweg 68, Amsterdam-6; 1968. 10 p. 26,5 x 20,5 cm., multobl. 2 rpk.

Esperanto Lehr-Briefe, de L. Grimme. Eld. Gesellschaft für internationale Verständigung, Vieno, (1968). Adreso: A-1150 Wien, Fünfhausgasse 16. Korespondaj lecionoj por germanlingvanoj.

Taschenwörterbuch Esperanto-Deutsch, de E. D. Krause. Eld. Verlag Enzyklopädie, Leipzig, 1967. 190 p. 13 x 9 cm., bind.* Poŝvortaro Esperanta-germana.

Elementos de Esperanto, de Fernando Soler y Valls. 4-a eldono, (la aŭtoro), Valencia, 1966. 30 p. 15 x 10 cm., frontispico. Lernilo hispanlingva.*

Doktoro Zamenhof, Esperanto kaj la Esperanto-Movado, de A. Middelkoop. Eld. LEEN, (1968). 11 p. 21 x 16,5 cm., multobl.

La telepatio kaj ĝia socia signifo, de Sokratis Sakellaropoulos. Eld. (la aŭtoro) Atheno, 1968. 96 p. 23 x 17 cm., multobl. 3,— gld.*

Marta, de E. Orzeszko. El la pola tr. L. L. Zamenhof. Eld. Editions Françaises d'Espéranto, Marmande, 1968. 213 p. 19,5 x 13 cm., ilustr., bind. Kvara eldono. Romano.*

Kantoj en Esperanto. Eld. Esperanto-Societo en Turku (1968). (48 p.) 15 x 10 cm. Sen muziknotoj.

Sesdek tradiciaj popolkantoj de Japanujo, komp. kaj tr. K. Matuba. Eld. Amo-Akademio, Japanujo, 1967. 136 p. 21 x 15 cm., ilustr., bind. Kun muziknotoj. 6,— gld.*

Aktoj de la Akademio 1963-1967. Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto - N° 5. Deponejoj: UEA, SAT. (Rotterdam, 1968). 75 p. 23 x 15 cm. 5,— gld. (20 st.)*

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex,
Anglujo. Telefono (01) 904 9081

CEI

"LA INTERNACIA LINGVO" EN LA ITALA

Jus aperis en la itala lingvo la unua ĉapitro de la verko "La Internacia Lingvo", en iom reduktita formo. La koncernan ĉapitron verkis siatempe la Direktoro de CED, prof. d-ro Ivo Lapenna, kiu ankaŭ redaktis la libron. La itala traduko estas eldonita en Trento per malavara helpo de la tiea komunumo. La eldonnombro estas 4000. La plano de Itala Esperanto-Federacio estas distribui ĝin ĉefe en la lernejoj okaze de la Eŭropa Tago.

ESPERANTO EN GRAVEGA KULTURA PERIODAĴO

Prof. ing. Oton Pancer publikigis artikolon sub la titolo "La Internacia Lingvo kaj la Antaŭenigo de la Scienco" en la gravega jugoslavia periodaĵo "Encyclopedia Moderna". La numero 5-6 de tiu periodaĵo konsistas el 400 grandformataj paĝoj. La artikolo de prof. Pancer ĉefe pritraktas la uzon de Esperanto por sciencaj celoj kaj, interalie, donas objektivan trarigardon pri la agado de Internacia Somera Universitato. Plejparte la artikolo estas bazita sur informoj ĉerpitaj el diversaj dokumentoj de CED. Ĝi sendube havos fortan pozitivan efikon en la intelektulaj medioj de Jugoslavio.

Internacia lingvo Esperanto, de M. Savir. Eld. Komisiono por Socia Edukado en la Mezgradaj Lernejoj, Ministerio de Edukado kaj Kulturo, Jerusalemo. 1967. 31 p. 24 x 17 cm. Hebrelingva informbroŝuro.*

Esperanto za šole in teĉaje. I. del, de Rudolf Rakuša. 3-a eld. Državna Založba Slovenija, Ljubljana, 1967. 175 p. 20 x 14 cm. Lernolibro slovenlingva.

Taglaboristoj, de Hans Kirk. El la dana tr. L. Friis kaj W. Jensen. Represo Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj, 1968. 218 p. 20,5 x 14,5 cm., bind. 13,50 gld.*


Aŭta terminaro, Esp.-jap.-ang., jap.-Esp.-ang., de Eyama tokiziro. Eld. Asake-Syoboo, Tokio, 1967. 122 p. 24 x 17,5 cm., multobl. 3,25 gld.*

La gazetara servo de la 50-a UK. Eld. Asake-Syoboo, Tokio, 1967. 109 p. 24 x 17 cm., multobl.*

La lingua internazionale, de Ivo Lapenna. Eld. Scuole Grafiche Artigianelli, Trento, 1968. 44 p. 17 x 11 cm., kun frontispico. Itallingva resumo de "La Internacia Lingvo" (1954).*

Ĉiujn eldonaĵojn signitajn per steleto oni mendu ĉe UEA, la aliajn ĉe la koncerna eldonejo.

espera
majo 1



I. Tambura
(Vidu: Malio)

LOKE

Aŭstralio

• Al la konata Propono al Unuiĝintaj Nacioj, transdonita en Nov-Jorko en 1966, aldonis siajn subskribojn ankoraŭ 3 membroj de la Federacia Parlamento kaj 8 membroj de la Okcident-Aŭstralia Parlamento.

Aŭstrujo

• Nova migranta Esperanto-ekspozicio aperis unue en la fervoja stacidomo Wien-Süd. Inaŭguris ĝin la 22-an de marto la personara direktoro de la Aŭstra Fervojo.

• Okaze de la 90-jara datreveno de la fondinto de Internacia Esperanto-Muzeo, la viena antaŭurbo Bisamberg donis al unu straton la nomon "Hofrat Hugo Steiner-Gasse".

Britujo

• De post la 18-a de marto nova loka radio-stacio en Stoke-on-Trent elsendas ĉiusemajnan Esperanto-programon. La suma daŭro estas 75 minutoj monate. La Monda Servo de BBC raportis pri la evento. Enhavo: kurso, informoj.

Bulgarujo

• Fondkunvenon de urba instruista Esperanto-societo en Sofio, kun pli ol 80 membroj, ĉeestis reprezentantoj de la Ministerio de Klerigo, Asocio de Bulgaraj Instruistoj k.s. (14.2.68).

Danujo

• De post 1936 la Internacia Altlernejo en Helsingør (Adreso: Den internationale Højskole, DK 3000-Helsingør), jam tiam internacie renoma, diskoniĝis plie pro la internaciaj feriaj Esperanto-kursoj ĉiujaraj. Nun, ekde oktobro 1967, funkcias ankaŭ regula Esperanto-kurso en la oficiala stud-programo. Ĝis nun la oficialaj instrulingvoj estas la dana kaj angla, sed, se sufiĉa nombro da esperant-lingvaj lernantoj enirus la lernejon, la akcepto de instruado per Esperanto ne estus malebla.

En la 17-a elementa lernejo en Sofio (Sofio 69, str. Suhodolska 2) lernas Esperanton 15 geinstruistoj, kun la intenco poste instrui al la infanoj. (Vidu ankaŭ: Bulgarujo)



Finnlando

• En Jyväskylä, centra Finnlando, okazos de la 3-a ĝis la 16-a de julio 1968, kiel ĉiujare, Internaciaj Kulturaj Tagoj kun riĉa programo. Ĉi-jare ili enhavos, dum la unua semajno, ankaŭ prelegojn en Esperanto ("Afriko kaj la lingva problemo" de Vilho Setälä kaj "Lingva diskriminacio" de John Milton) kaj tritagan Esperanto-kurson. Informas: Esperanto-Klubo, poŝtfako 18086, Jyväskylä.

Japanujo

• En nova japanlingva verko de Kiotaro Deguti, "Onisabro Deguĉi, la Giganto" (pri la kunfondinto de la Oomoto-movado) troviĝas ĉapitro pri la Internacia Lingvo.

Malio

• Kurson gvidas en la junulara kulturdomo de la ĉefurbo Bamako, de post 3 mar 68, s-ro Ibrahim Tambura, la delegito de UEA. La kurson aprobis la tutlanda komisiono por la junularo C.N.J., kaj la ŝtata radio 6-foje informis pri ĝi.

Unuiĝinta Araba Respubliko

• La delegito en Kairo, s-ro Nassif Isaac, konstruigis vilaon en la kamparo 100 km. de Kairo por gastigi turistojn, kiuj anoncos sin minimume unu monaton antaŭ la alveno.

FAKE

Diplomatio

• Montriĝis falsa la informo, ("Esperanto", januaro 1968, p. 8), ke la nederlandaj ambasadoj uzas vizitkartojn kun Esperanta teksto.

Edukado

• Rezulte de la asocia membriĝo de UEA al FIOCES, la brita Edukministerio nun regule informas pri UEA kiel peranto de lernejaj interŝanĝoj en cirkuleroj al britaj lernejoj.

Turismo

• Rezulte de la klopodoj de UEA okaze de la Internacia Jaro de Turismo 1967, la nombro de fakdelegitoj pri turismo altiĝis de 160 en 1967 ĝis 185 en 1968: kresko de 16%.

PERSONE

Ariste

• Paul Ariste, membro de la Estona Akademio de Sciencoj, verkis enciklopedion pri 670 lingvoj hodiaŭ parolataj. Tiel raportas "Moscow News". Prof. Ariste estas membro de la Akademio de Esperanto.

Dahl

• Pacpremion de la Stokholma Pacasocio ricevis por 1967 komitatano de UEA s-ro Einar Dahl. Ĉiun trian jaron ricevas la premion persono plej multe kontribuinta al la antaŭenigo de internacia lingvo.

Ossaka

• La 28-an de junio 80-jariĝas prof. Kenĉi Ossaka, fondinto de Japana Esperanto-Instituto, honora membro de UEA, akademiano ktp.

GRAVA ATENTIGO PRI LA TASKOJ DE LA DELEGITOJ

SinJORINO Joyce J. Sotiraki, kiu siatempe estis delegito de UEA por sporto en Aleksandrio, atentigis nin pri diversaj malagrablaĵoj, kiujn ŝi spertis nur tial, ĉar oni skribis al ŝi neoportunajn leterojn, kun politika enhavo, kiuj neniel rilatis al ŝia tasko de delegito pri sporto. Pro la menciitaj malagrablaĵoj ŝi sentis sin devigita rezigni pri sia delegiteco. Nun, post interparolo kun la prezidanto de UEA, ŝi denove pagis la kotizon de MA por du jaroj anticipe kaj reakceptis la taskon plue funkcii kiel delegito de UEA en Aleksandrio.

Ankaŭ pli frue unuopaj delegitoj plendis, ke oni turnas sin al ili pri aferoj, kiuj havas nenion komunan kun ilia akceptita tasko, aŭ konsiderinde transiras la limojn de la tasko. La Regularo pri la servo de informpetoj al delegitoj troviĝas en ĉiu Jarlibro de UEA. Ni afable, sed plej insiste petas ĉiujn membrojn, kiuj sin turnas kun informpetoj al la delegitoj de la Asocio, atente studi la Regularon kaj agi konforme. La delegita reto de UEA estas unika en la mondo kaj prezentas unu el la plej gravaj praktikaj servoj al la membraro. Niaj sindonaj delegitoj, vicdelegitoj kaj fakdelegitoj plenumas admirindan laboron tute libervole kaj sen ia kompenso. Oni respektu ilian sindonon kaj ne skribu al ili pri aferoj, kiuj ne nur ne rilatas al ilia funkcio, sed pro kiuj ili eĉ povus havi personajn malagrablaĵojn.

Samtempe ni atentigas la delegitojn mem, ke nenio devigas ilin respondi al informpetoj, kiuj en unu aŭ alia punkto ne estas konformaj al la Regularo pri la Servo.

ESPERANTO EN RADIO

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la aprilan eldonon.

RADIO ROMA prezentas sian programon ĉiudimanĉe de 20.00 ĝis 20.20 per ondoj 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). Jen la programo por majo kaj junio: 5-V, Tra la literaturo; 12-V, Novaĵoj el Italujo; 19-V, Italaj kanzonoj en Esperanto; 26-V, Leterkesto; 2-VI, La itala poeto Giuseppe Ungaretti; 9-VI, La urbo Cefalù kaj ĝia normanda katedralo; 16-VI, La itala komponisto Ildebrando Pizzetti; 23-VI, La mirindaj grotoj de Castellana; 30-VI, Kristana mondo. La dua parto de ĉiu elsendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto".

RADIO BUDAPEST prezentas sian ĉiutagan programon laŭ la jena programo: ĉiun labortagon, pririgardo pri la ĉefaj politikaj eventoj de la tago kaj informoj pri la Esperanto-vivo; en ĉi-tiu kadro estas disaŭdigataj marde pririgardo de Esperanto-rilataj artikoloj de diversaj gazetoj, merkrede informoj el Esperanto-vivo, vendrede rubriko "Niaj aŭskultantoj raportas", sabate intervjuo kun iu esperantisto. Ceteraj konstantaj programeroj estas: lunde sportaj raportoj, ĵaŭde leterkesto de Ludoviko

Pusztai, dimanĉe kultura programo kun muziko; la duan dimanĉon de ĉiu monato la disaŭdigo estas speciale dediĉata al infanoj. En la aliaj tagoj de la semajno, rubrikoj pri literaturaj, historiaj, lingvistikaj temoj, hungarlandaj raportoj, aktualaj komentarioj.

BRAZILA RADIO. La stacio "Rádio Ministério da Educação e Cultura" en Rio de Janeiro dissendas marde kaj sabate de 12.00 ĝis 13.00 (G.M.T.) programon, kiu konsistas el muziko kaj informoj pri artoj, sciencoj, edukado kaj Esperanto; ĉiu ero daŭras 3 minutojn. Ondlongoj: 30.71 m (9770 kcs), 25.10 m (11950 kcs), 16.79 m (17875 kcs). Adreso de la stacio: Praça da República 141 a, Rio de Janeiro (Guana-barra), Brazilo.

RADIO WIEN nun disaŭdigas sian programon ĉiun alternan merkredon de 13.45 ĝis 14.00 per sama ondlongo: 203 m (1475 kcs). Venontaj elsendoj okazos je 15-V, 29-V, 12-VI, ktp; la elsendo ne okazos la 1-an de majo.

53-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Madrid, 3-10 aŭgusto 1968

Alta Protektanto: Ĉef-Generalo Francisco Franco, Ŝtatestro de Hispanujo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 7

Rotterdam, la 16 apr 68

Arta Festivalo

Okazos prezentoj de Internacia Arta Teatro (i.a. "Maskerado" de Krleža, "Bela indiferentulo" de Cocteau kaj "Suspektinda persono" de Nušić) kaj Bulgara Esperanto-Teatro, ĥorkoncerto kaj varia arta vespero.

Oratora Konkurso

Pri la temo "Florinfanoj" ni aldonu, ke temas pri gejunuloj diverslandaj, kiuj klopodas malproksimigi sin de la organizita socio kaj ĝia politiko. Tipaj estas sloganoj kiel "Ne Armu, Sed Amu" kaj la simbola sinornamado per floroj.

Internacia Somera Universitato

Prelegos Prof. E. A. Bokarev, s-ro Ralph L. Harry, s-ro Lajos Lesznai, prof. I. Lapenna, prof. Vasil Peevski, prof. J. Régulo-Pérez, d-ro H. R. Tonkin kaj prof. G. Waringhien.

Ejoj

La Inaŭguro okazos en la kovrita Sporta Stadiono, la teatraj prezentoj en Teatro Zarzuela, la Balo en la ĝardeno Vistillas kaj la Bankedo en Hotelo Plaza.

Statistiko (je 22 apr 68)

Arg. 1, Aŭstral. 6, Aŭstrujo 10, Bel. 33, Bra. 5, Bri. 88, Bul. 46, Ĉeĥ. 15, Dan. 19, Finn. 22, Fra. 195, Ger. 50, Gre. 8, His. 271, Honk. 2, Hun. 16, Isl. 2, Isr. 7, Ita. 68, Jap. 17, Jug. 237, Kan. 3, Kor. 2, Meks. 2, Monako 4, Ned. 48, Nor. 16, NZ. 3, Pol. 27, Portu. 18, Sov. 1, Sve. 34, Svi. 10, Tunis. 1, UAR. 1, Uru. 1, Usono 29. Entute: 1318 el 37 landoj.

G. G. Pompilio,
Konstanta Kongresa Sekretario





LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z., Nederlando**

BEJO KAJ "IMPULSO"

Eksprosas la semo. "Impulso" aperas unu-numere. Konkretiĝo de delonge nutrata revo, BEJO, "Impulso" reprezentas super ĉio altvaloran interligilon por ĉiuj junuloj de la lando. Per la supra frazo la nova gazeto de la brazila Esp. junularo prezentas sin. Vera gazeto: presita (!), trimonata, 8-paĝa, tute en Esperanto – kaj kia Esperanto. La redaktoro, Roberto P. Nogueira, meritas komplimenton por senmakula, evoluinta lingvaĵo, maloftaj preseraroj, klara tipografio. Nur mankas ilustraĵoj (enestas nur unu). La relative bona presaspekto alportas ankaŭ honoron al la presejo de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Tiu kooperativo jam delonge apogis la pioniran laboron, en la pasintaj jaroj, de la Guanabara Esperanto-Junularo, el kio kreskis nun BEJO.

Fakte estas bedaŭrinde, ke "Impulso" elstaras pro la supraj ecoj inter aliaj gazetoj de TEJO-sekcioj. Tiuj ecoj devus esti normalaj, komunaj al ĉiuj. Bedaŭrinde tiel ne estas, kaj tutnova sekcio en t.n. "evolulando" devas doni la ekzemplon al multaj pli aĝaj sekcioj.

Ne nur la vestaĵo estas korekta, ankaŭ la enhavo estas valora. Jen: propono de kompleta laborprogramo, verva raporto pri popularmuzika festivalo en Rio, internaciaj novaĵoj, tekstoj por Esp.-opero, poemoj kaj prozo, citaĵoj el verkoj de Zamenhof.

La sola adreso menciita estas tiu de Roberto P. Nogueira, redaktoro, Rua Barbosa de Freitas 1595, Fortaleza. Supozeble li bonvenigos proponojn pri kunlaboro, kaj ankaŭ abonojn (kontraŭ 7,50 gld. jare).

Post ĉi tiu bonega elpaŝo, ni povas nur deziri al "Impulso" longan, samnivelan vivon, kaj merititan sukceson.

UNUAFOJE SENDEVIZA INTERSANGO DE E-GRUPOJ INTER POLLANDO KAJ SOVETUNIO

Dank' al la helpo de la Turisma Servo de TEJO okazis en februaro valora Esperanto-ekskurso de 20-persona Esp.-grupo de polaj skoltgvidantoj de BANJO kaj membroj de PEJ. Oni vizitis Litovan kaj Latvan SSR. Modelan kaj amikan akcepton aranĝis la E-klubo "Juneco" en Vilnius, "Amikeco" en Kaunas, kaj "Estonteco" en Riga.

Oni interŝanĝis interesajn spertojn inter PEJ kaj SEJM (Soveta Esperanto-Junulara Movado). La pola gazetaro, kiu multe skribis pri la vojaĝo, nomis ĝin "Esperanta vizito de

amikeco". En aprilo reciproke vizitis Varsovion, Bydgoszcz kaj Torun litova Esperanto-grupo kaj partoprenis la IV-an Internacian Esperanto-Seminarion dediĉitan ĉefe al Nikolao Kopernik.

La tuta interŝanĝo okazis laŭ sendevizaj reguloj. Ĝin gvidis kaj raportis la aktiva prezidanto de PEJ, Andrzej Grzebowski.

OKAZONTAĴOJ

La Turisma Servo de TEJO atentigas pri:
Internacia Kunveno de IFEF-Junularo, 12 majo, Varna (Bulg.).

Temo: Organizaj laboroj. Kotizo \$ 8, adreso: D-ro Imre Ferenczy, Pf. 143, Győr 2 (Hung.).
Monda Festivalo de MFDJ, 28 julio-6 aŭg. Sofio. Esperanto-tagon organizas P. Todorov, ĉe BEA, Pk. 66, Sofio.

7-a Internacia Esperantista Junulara Laborbrigado, 10 aŭg.-8 sept., Novi Beograd (Jug.), senpaga restado, aĝo 16-30 j., adreso: JEJA, Svetog Save 16-18, Beograd.

Internacia Esp. Seminario, 21-23 junio, Solgaarden (Sved.), temo: "Socioj kaj grupoj". Adreso: SEJU, f-ino Ingrid Carlsson, Linderbergsgatan 4, Sundsvall (Sved.).

Internacia labortendaro kun elementa E-kurso, 14-31 aŭg., Vaals (Ned.), nur por spertaj, junaj esp-istoj, kiuj povas gvidi kurson aŭ povas kantigi, ludigi, ktp. kursanojn. Adreso: J. M. Liouville, 6, Rue Léon Vaudoyer, Paris 7-e.

3a Seminario por gvidantoj de TEJO kaj NEJOj, 25-31 aŭg., Bruselo. Broŝuro havebla, kun plenaj detaloj, ĉe H. Bakker, Kastelenstr. 231, Amsterdam Z.

Internaciaj Esperanto-Laborbrigadoj en Pollando, 29 junio-14 sept., senpaga restado. Adreso: ul. Piotra Skargi 3, Bydgoszcz. Por kelkaj periodoj jam ne plu estas loko.

Internacia Turisma Kongreso de Szeged, 15-25 julio. Adreso: Lenin krt. 61, Szeged, (Hung.), kie broŝuro estas havebla.

Internacia Jubilea Kunveno de PEJ, Bialystok, 14-15 sept. 1968. Adreso: ul. Jasna 6, Varsovio. Lastmomenta anonco:

Pentekosta internacia kunestado, 31 majo-3 junio, Graz (Aŭstr.), temo: "Junularo protestas". La programo estos nekutima kaj inkluzivos diskutojn sub libera ĉielo, hipian feston, ktp. Kotizo 250 aŭstr. ŝil., ĉio inkl. Adreso: Hans Michael Maitzen, Mozartgasse 4, 8010 Graz, kiu emfazas, ke la aranĝo estas radikala novaĵo, kaj laŭ formo kaj laŭ temo, kaj ke ĝi estas eksperimento por sekvonta pli granda aranĝo. Tial AEJ alvokas al amasa partopreno.

ORGANIZANTOJ ATENTU: Kongreskalendaro por 1969

– aperos en Esperanto, franca kaj angla lingvoj en oktobro 1968.

Informojn por ĝi la Turisma Servo de TEJO akceptas ĝis fino de septembro 1968.

Adreso: A. Grzebowski, ul. M. Curie-Skłodowskiej 10/3, Bydgoszcz 9 (Pol.).

INTERNACIAJ KONKURSOJ 1968

stato je la 31-a de marto 1968

Konkurso I

Pozicio lando	kvoto	poentoj	%
1 (1) Nederlando	5322	4450	83,62
2 (2) Britujo	6095	4541	74,50
3 (7) Svedujo	6415	4745	73,97
4 (5) Francujo	7234	5114	70,69
5 (14) Finnlando	2608	1800	69,02
6 (6) Usono	4144	2830	68,29
7 (4) Italujo	3816	2600	68,13
8 (3) Svislando	1949	1215	62,34
9 (10) Jugoslavio	3792	2345	61,84
10 (9) Brazilo	3188	1903	59,69
11 (8) Danlando	2764	1550	56,08
12 (12) Hispanujo	2919	1525	52,24
13 (13) Japanujo	3829	1995	52,10
14 (11) Germanujo	6579	3345	50,84
15 (15) Belgujo	1912	895	46,81

Konkurso II

1 (1) Kanado	955	765	80,10
2 (5) Aŭstrujo	1270	965	75,98
3 (2) Madagaskaro	250	187	74,80
4 (4) Israelo	488	355	72,75
5 (9) Aŭstralio	1327	794	59,83
6 (3) Sud-Afriko	250	145	58,—
7 (6) Nov-Zelando	1265	655	51,78
8 (7) Norvegujo	1460	625	42,81
9 (11) Islando	250	105	42,—
10 (8) Grekujo	250	90	36,—
11 (10) Argentino	693	185	26,70

(Reguloj aperis en februaro, p. 31. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn).

Majo MEMORIGA KALENDARO

- 4-5 Kongreso CDEL, Køge, Danujo
- 5 Esperanto-Tago, Foiro de Lille, Fr.
- 11-17 IFEF-Kongreso, Varna, Bulgarujo.
- 19-21 Bulgara Kongreso, Varna
- 25 Jarkunveno LEEN, Utrecht, Nederlando
- 31-4/6 Germana Kongreso, Munkeno

Junio

- 1-3 Belga Kongreso, Bruselo
- 1-3 Sveda Kongreso, Sundsvall
- 1-15 Int. Kulturaj Ferioj, Bled, Jug.
- 5-15 Int. Ferioj Pavel Bania, Bulgarujo
- 8-16 Int. Ferioj Salzburg, Aŭstrujo
- 13-16 Aŭstra Konferenco, Salzburg
- 15-30 Int. Kulturaj Ferioj, Dubrovnik, Jug.
- 20-30 Int. Ferioj Pavel Bania, Bulgarujo
- 21-30 Int. Renkontiĝo, Poděbrady, Ĉeĥos.
- 25 Limdato por aliĝo al la UK Madrid
- 28-30 Kanada Kongreso, Toronto
- 30-21/7 Esperantaj Studoj, Grésillon, Francujo

Julio

- 1 Limdato Foto-Konkurso 53-a UK
- 1-14 Int. Kulturaj Ferioj, Porec, Jug.
- 3-16 Int. Kulturaj Tagoj, Jyväskylä, Finn.
- 6-13 Somera Esp.-Universitato, Gyula, Hung.
- 7-14 Int. Renkontiĝo, Rostock, Germanujo
- 7-20 Int. Kursoj, Piešťany, Ĉeĥoslovakujo
- 11-14 Usona Kongreso, Covina, Kalifornio
- 15-25 Int. Turista Kongreso, Szeged, Hung.
- 15-28 Int. Kulturaj Ferioj, Primošten, Jug.
- 18-25 Int. Semajno en Drôme, Francujo
- 20-30 Naturamika Renkontiĝo, Abaliget, Hung.

- 21-28 Int. FERIAJ Kursoj, Helsingør, Dan.
- 22-27 Int. Seminario por Gvidantoj, Grésillon
- 25-1/8 Kongreso IKUE/KELI, Limburg, Germ.
- 27-3/8 TEJO-Kongreso, Tarragona, Hispanujo

Aŭgusto

- 3-4 Japana Kongreso, Sapporo, Hokkaidō
- 3-9 Kongreso SAT, Utrecht, Nederlando
- 3-10 53-a Universala Kongreso, Madrid
- 4-25 Kulturaj Semajnoj, Grésillon, Franc.
- 10-15 Oficiala Postkongreso, Zaragoza, Hisp.
- 10-17 Postkongreso SAT, Haarlem, Nederlando
- 10-20 Int. Pedagoga Seminario, Szeged, Hun.
- 11-17 Int. Geografia Semajno, Bilbao, His.
- 11-19 Int. Ferioj, Krommenie, Nederlando
- 15-30 Int. Kulturaj Ferioj, Rovinj, Jug.
- 16-23 Kongreso STELO, Aix-en-Provence, Fr.
- 25-31 Eŭropaj Ferioj, Gwatt, Svisujo
- 25-8/9 Studperiodo, Grésillon, Francujo
- 31-15/9 Int. Kulturaj Ferioj, Jabljak, Jug.

Septembro

- 17-30 Int. Ferioj, Międzygórze, Polujo
- 20-29 Int. Instruista Kunveno, Sonnenberg
- 28 Int. Renkontiĝo, Bystrzyca Kł., Pol.

ĈEFDELEGITO

Germanujo. S-ro Reinhard Haupenthal: nova tel. numero: 06897-2156.

NOVAJ DELEGITOJ

AŬSTRALIO

Orange (N.S.W.) 23 000. D: Frank Acs, komercisto 147 Woodward St., Orange N.S.W. 2800; tel. 622447.

BULGARUJO

Karlovo. FD (Maŝinoj): Bojidar Leonov, Car Asen 7.

Trojan. 30 000. D: Lalju C. Lalev, kontisto, str. Parvomajska 29.

FINNLANDO

Jyväskylä. FD (Instruado): S-ino Terttu Tynnelä, instruistino, Taidepolku 6 J; tel. 941-12238.

FD (Elektrotekniko): Martti Nevalainen, teknikisto, Kangasvuorentie 3 B 9; tel. 71252.

FRANCUJO

Mulhouse. FD (Edukado): F-ino Alice L. Rihn, ekslernejestrino, 76, rue de Verdun.

GERMANUJO

D-4714 **Selm** (Westfalen) 15 500. D: Hartmut Werdermann, instruisto, Im Ort 5; tel. 02595-5687.

D-423 **Wesel** (Nordrh.-Westfalen) 35 000. D: Kurt Schut, asekuroficisto, Friedrichstr. 2; tel. 23736.

IRLANDO

Cill Áirne (Co. Chiarraí) 6 800. D: Eoin Ó Carra, instruisto, 79, An tSráid Nua.

ITALUJO

I-00141 **Roma.** FD (Mondfederalismo): Carmela Cimino, instruisto, Via Monte Erice, 10; tel. 882095.

I-10128 **Torino.** FD (Astronomio): Aldo Torti, arkitekto, Corso Re Umberto 63; tel. 400249.

I-70019 **Triggiano** (Bari) 16 000. D: Nicola Lasalandra, instruisto, P.V. Veneto 21.

oficiala infor
n-ro 412, 1 apr.

espera
majo 1

JAPANUJO

Amagasaki (Hyogo-ken) 520 000. FD (Turismo): Zensuke Kusuda, oficisto, 195, Kanda-kitadori VII; tel. 06 411-8844.

Kameoka. FD (Junularo) Yoshimi Umeda, sekretario, Redakcio de Oomoto, Kioto-hu; tel. 760 (tage).

JUGOSLAVIO

Ljubija (Bosna) 7 000. D: Anto Mlinar, oficisto, Tone Perića 16.

Ljubljana. FD (Juro): Svobodan Zlatnar, juristo, Celovška c. 145a.

Loznica (Srbija) 21 000. FD (Abe'bredado): Radojica Aleksić, profesoro, ul. Njegoševa 22-c.

Mužlja (Vojvodina) 6 000. D: Mirko Gluvakov, oficisto, 9 maja Nro. 23. FD (Turismo): la D.

Osijek. D: Saša Kocian, oficisto, Radićeva 11. FD (Naturismo): la D.

Pula 45 000. D & FD (Turismo): Ĝemali Šehu, metiisto, Obala Maršala Tita 2/I.

Split. VD: Marin Firić, laboristo, Jugoplastika. JD: S-ino Mirjana Radovčić, ekonomistino, Graničara 1/VII.

FD (Metioj: koloriga): Grgat Davor, kolorigisto, Dvornikova ul. 2-a.

FD (Turismo): la JD.

Varaždin. FD (Presado): Eduard Vrbanc, maŝinkompostisto, Križničeva 40.

KANADO

Kelowna (B.C.) 20 000. D: Christie W. Roberts, komercisto, R.R.2, Highway 97; tel. 765-6417.

MEKSIKO

Mexico. VD: F-ino Alicia Zepeda Espinosa, oficistino, Altemirano 75-1, Mexico-4, D.F.; tel. 35-33-76.

NEDERLANDO

Groningen. VD: Pieter H. Snoek, teknikisto, Bilderdijklaan 12; tel. 28945.

Leeuwarden. FD (Instruado): F-ino Salome van der Zee, instruistino, Leeuwerikstraat 156; tel. 33027.

FD (Turismo): Jan Koopal, muntisto, Curaçao-str. 13c.

Sneek (Friesland) 24 000. D: Klaas Niemeijer, Lemmerweg 9; tel. 05150-2127.

NOV-ZELANDO

Wanganui. FD (Edukado & Religio-Kvakerismo): S-ino Jeanie Wilson, instruistino, 37 Peake's Road; tel. 5887.

POLLANDO

Bielawa. FD (Inĝenierado): Romuald Pacholec, inĝeniero, Zeromskiego 29/3; tel. 44-79.

Bydgoszcz. FD (Historio, Studentaj aferoj, Turismo): la FD (Skoltismo).

PORTUGALUJO

Ponta do Sol (Madeira) 15 000. D: F-ino Maria E. Vieira Caetano, domestrino, Residência Paroquial.

SUD-AFRIKO

Somerset West. D: Edwin de Kock, docento, Helderberg College, P.O. Box 22; tel. 2-2046.

FD (Edukado): la D.

SVEDUJO

Lund. JD: Anders Jägervall, medicina studento, Magistratvägen 55, B-421; tel. 046/146163.

SVISLANDO

CH-6082 Goldern. FD (Edukado): Florence Cool-Côté, instruistino, Goldern; tel. 036-52883.

USONO

Austin (Texas) 245 000. D: Neal Parker, studento, 1620 West 12th St., Texas 78703; tel. 477-6819.

Highland Park. FD (Radiobiologio): la D.

Honolulu. FD (Lingvistiko & Radio): la D.

Laurel (Maryland 20810). D: Paul E. Nace, inĝeniero, 8906 Royal Ridge Lane; tel. (301) 776-7246.

FD (Elektrotekniko): la D.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1968)

Aŭstralio. Seymour.

Aŭstrujo. Graz: FD (Akcidentoj, malebligo de).

Belgujo. Bruxelles: FD (Blinduloj). Overijse.

Brazilo. Recife: FD (Elektrotekniko). Salvador: D.

Britujo. Birmingham. Norwich: JD.

Finnlando. Hämeenlinna: D.

Francujo. Calais: VD. Paris: FD (Junulargastejoj).

Jugoslavio. Šibenik: FD (juro).

Nov-Zelando. Christchurch: D. Hastings.

Svislando. Biasca.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Buttinger, s-ro Philip, London, Britujo.

Mallet, f-ino E. E., Edgware, Britujo.

Smith, s-ro Malte, Kävlinge, Svedujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1968

178 Azevedo, s-ro Mauro G.; 179 Dionísio, s-ro C. H.; 180 Gama, s-ro Joao de Oliveira; 181 Nunes, s-ro Elmo Pereira; Brazilo. 182 Bellatti, s-ro S. E.; 183 Berry, f-ino E.; 184 Crabtree, s-ro E. P.; 185 Goulding, s-ino E.; 186 Hanson, s-ro C. G.; 187 Hardy, s-ino R; 188 Hardy, s-ro S; 189 Hockey, f-ino M. J.; 190 Kennedy, s-ro D; 191 Kennedy, s-ino M; 192 Knight, s-ino E. B.; 193 Laurie, s-ro E. J.; 194 Laurie, s-ino W.; 195 Mee, s-ro L.; 196 Murray, s-ro R.; 197 Pilling, f-ino F.; 198 Prince, s-ro A.; 199 Relf, s-ro E. F.; 200 Ryan, s-ino J. S.; 201 Seddon, s-ino R.; 202 Sly, s-ro K. A.; 203 Strangman, s-ro P. G.; 204 Withey, s-ro D. H.; Britujo. 205 Piotrowski, s-ro S. Z.; Danlando. 206 Lapierre, s-ro Marcel; 207 Martin, s-ro Robert; 208 Ploussu, s-ro Augustin; Francujo. 209 Schumacher, f-ino Margarete; 210 Wehrheim, d-ro H.; 211 Wingen, s-ro W.; Germanujo. 212 Oliván Hernando, s-ro Salvador; Hispanujo. 213 Sigudsson, s-ro Leifur; Islando. 214 Waksman, s-ino Henia; Israelo. 215 Jerković, s-ro B., Irano. 216 Sparado-Terrazzani, s-ino L.; 217 Viti, s-ro G., Italujo. 218 Kocjančić, s-ro K., Jugoslavio. 219 Choi, s-ro Bong-Yeol; 220 Rhie, s-ro Dae-Young, Koreujo. 221 Adelaar, f-ino L., Nederlando. 222 Armanis, s-ro Andrejs; 223 Engen, s-ro Per; 224 Ringstad, s-ro G., Norvegujo. 225 Moore, s-ro V. R.; 226 Wiltshire, s-ro Arthur G., Nov-Zelando. 227 Eriksson, s-ro Axel; 228 Hedaeus-Eriksson, s-ino M.; 229 Hedlund, s-ino I.; 230 Mellberg,

f-ino G.; 231 Olsson, f-ino Agda; 232 Persson, s-ro Gösta; 233 Persson, s-ro O.; 234 Sedendahl, s-ro Verner; 235 Söderberg, s-ro K., Svedujo. 236 Chobanoff, s-ro Stefan; 237 Doneis, s-ro A. F.; 238 Doneis, s-ino Mary; 239 Mickle, s-ro Gerald S., Usono.

DONACIOJ POR GENERALA KASO (Gld.)

Germanujo: Kraus, s-ro F., 4,50. Hungarujo: Somlai, s-ro L., 30,—. Nederlando: Baris, s-ro W. 15,—, Bossong, s-ro R. H., 10,—. Nov-Zelando: s-ro Mac Namara, 80,—. Svedujo: Edler, s-ro Per, 4,50. Usono: Petersen, s-ro H., 4,14.

FONDAJO CANUTO

Nederlando: Zeiler, s-ro F., 1 MA.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino, C.O.

ANONCETOJ

Ni elkore dankas al ĉiuj sendintoj de salut-kartoj kaj esperantaĵoj por nia lerneja ekspozicio. Dank' al vi, ĝi finiĝis sukcesplene. Tomita Gakuen Esperanto-Klubo, Nagamori Noishiki, GIFU, Japanujo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiulandaj junulinoj s-ro Toshio Arai, 313 Yagi-cho Omihachiman, Shiga-ken, Japanujo. 17-jara studento.

Oni vendas bienon: 240 hektaroj, sep mil olivujoj, kampodomo, elektro, akvo. Pri detalo skribu al s-ro Angel Enríquez, Rus, Jaen, Hispanujo.

U.F.E. ĵus reeldonis "ABC d' Esperanto à l' usage de ceux qui aiment les lettres", franc-lingva verko de prof. G. Waringhien, prezidanto de la Akademio. La unuaj mendintoj ricevos dediĉitan ekzempleron de la aŭtoro. Mendu tuj ĉe UFE, 34 rue de Chabrol, Paris (10ème). Prezo 3,50 fr.fr. plus afranko.

Mondcivitanoj parolas al vi... De longe Mondcivitanoj ne tute fidis al UN, kiu montris sian nekapablecon solvi la transnaciajn problemojn, inter kiuj la lingvan. Ili klopodas, por ke estu kreita Monda Transnacia Institucio, kiu vere reprezentos la popolojn kaj vere volos helpi ilin. Ĉiuj, kiuj deziras pliajn informojn, bonvolu skribi al s-ino Renée Volpelière, 10 rue de la Servie, 30-Nîmes, Franc.

Letervespero okazos komence de junio. Bonvolu sendi bildkarton al f-ino Meynard, Esperanta Grupo, 79 avenue Saint-Cloud, 78-Versailles, Francujo. Bildkarto Versailles garantiata.

Korespondanton en Brazilo? Skribu al Koresponda Servo de Brazila Esperantista Junulara Organizo, Caixa Postal 18 ZC 00, Rio de Janeiro.

Kiu alilanda junul(in)o, kiu scias pri kampara laboro, emas en julio-aŭgusto gastloĝi, labori kaj paroli Esp. ĉe nederl. bienhavanta familio? Eblas vidi la landon kaj ricevi rekompencan. Inf.: ĉe E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Geinstruistoj! Gelernantoj! Sendu viajn desegnojn por Esperanta elmontro, dum nia festa semajno. Temo: "Festo". Sendu: desegnojn, nomon, adreson, aĝon, lernejon kaj landon. Antaŭ 30-a de novembro 1968. Adreso: Box 838, Dunedin, Nov-Zelando. Ni petas vian subtenon.

Karavanoj kaj individuaj personoj, kiuj intencas tranokti, resti aŭ trapasi Barcelonon, pensu, ke Hispana Esperanto-Instituto preparas diversajn aranĝojn por gastigi ĉiun kaj ĉiujn niajn vizitontojn. Barcelono atendas vin. Tre helpos nin via frua sinanonco. Hispana Esperanto-Instituto, Apartado 2428, Barcelona. Telegrafa adreso: "Esperantoservo Barcelona".

Hispanio por vi, sincera oficiala rakonto pri Hispanio nepre taŭga por niaj vizitontoj. Nun senpage ricevebla. Petu tiun libron de Hispana Esperanto-Instituto, Apartado 2428 Barcelona. Aldonu unu respondkuponon.

Vizitu Hispanion sen lingvaj problemoj pere de Esperanto. Poŝtvortaro Esperanta-hispana kaj hispana-Esperanta. Sendu ses respondkuponojn al Hispana Esperanto-Instituto, Apartado 2428, Barcelona, kaj vi ricevos ĝin per rekomendita poŝto.

Ĉu vi konas la librojn de George Adamski, usonano? Ĉu li diras la veron? Se vi scias pri faktoj rilate la temon, bonvolu skribi al s-ro K. G. Gustafsson, Folkungagatan 20 D, Skövde, Svedujo. Korespondas Esperante kaj angle.

Hispanujo, lando la plej sekura. Des pli, se vi uzas la servojn de Hispana Turista Assekuro. Informojn donas: Hispana Esperanto-Instituto, Apartado 2428, Barcelona. Aldonu unu respondkuponon.

Juna membr(in)o de Ruĝa Kruco estos bonvena por unusemajna junulara restado en okcidenta Svedujo 16-30 junio. Petu informojn ĉe: Distrikto Skaraborg de Sveda Ruĝa Kruco, Poŝtfako 16, S-541 01 Skövde 1, Svedujo.

Por fari esperantistan ekspozicion, la duan duonjaron, sendu, de ĉiuj landoj, revuojn, ĵurnalojn, tiaspecajn gazetojn al Niteroja Esperanto-Junularo, Rua 15 de Novembro, 144/603, Niterojo, Brazilo.

Per leteroj aŭ poŝtkartoj, de ĉiuj landoj, petante, ke oni ne forigu la instruadon de Esperanto de gimnazio Lara Vilela, skribu al Campanha Nacional de Educandários Gratuitos, Rua Padre Anchieta 20, Niterojo, Brazilo.

Ĉu vi estas ĝuste informita pri la katolika eklezio kaj ĝia tutmonda agado? Abonu la organon de I.K.U.E., ESPERO KATOLIKA. Jarkotizo svisaj fr. 13.— Mendebla ĉe: Centra Oficejo de IKUE, CH-9106 Zürchersmühle, Svislando.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Graĵoj en Vento". Unikaj en la mondo! Graĵoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

MENDU LA BINDITAJN KOLEKTOJN DE
MONDA KULTURO

Bela kaj fortika, dukolora bindo kun ora sur-
preso. Poezio, noveloj, priartaj artikoloj, ĉiam
legindaj. Tre konvenaj kiel donacoj, ĉu unuope,
ĉu kune.

Vol. 1 (1962-64), 288 + 36 p., 27 × 19 cm.

Vol. 2 (1965-66), 168 + 24 p., 30 × 21 cm.

Prezoj: ĉiu volumo po 19,— gld.

plus sendokostoj 10 %

Libroservo de UEA

APERIS DUA ELDONO (1967)

de la plej vaste uzebla anglalingva
dokumento de CED:

**"Basic Facts about the International Language
Esperanto" (Doc. RDC/7)**

Tute reviziita kaj ĝisdatigita teksto.

Prezo: 0,50 gld.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA

**Kiel ĉe vi oni instruas la arton al infanoj,
gejunuloj, studentoj?**

Egale ĉu temas pri pentro, desegno, presado
el div. surfacoj aŭ tra skreno (streĉita poroza
ŝtofo), skulpto, konstruo, ceramiko aŭ aliaj
formoj —

grava angla kolegio de arto interesiĝas, kaj
rekomenpencos vian kunlaboron.

Ni deziras ricevi aŭ desegnojn kaj pentraĵojn
(donace aŭ prunte) aŭ fotojn kaj kolorajn
lumbildojn, kiuj ilustras la verkojn, kun
koncizaj detaloj kaj komentario. Ni reciprokos
per similo aŭ en alia adekvata maniero laŭ
via deziro. Skribu al:

**Prof. R. Rossetti, Pedagogia Fakultato, West
of England College of Art, 15 Cotham Rd.,
Bristol 6, Anglujo.**

Antaŭ la Universala Kongreso en Hispanujo ...

nepre legu: **VIVO KAJ ARTO DE GOYA**
de Agostinho da Silva. 24 p. 17,5 x 13 cm.,
kun 10 ilustraĵoj kaj bibliografio.

Prezo: 0,50 gld. plus afranko. Libroservo UEA.

La Feliĉo

kaj ses aliaj kantoj en esperanto

Kantas:

Ramona van Dalsem

akompanas:

TOOS SCHOONMAN


La plimulto de la tekstoj kaj melodioj estas
verkitaj de la kantistino mem, kiu gajnis per
tiuj ĉi kantoj la **unuan premion** en amatora
konkurso en Nederlando.

Senriproĉa prononco
Klarega lingvo

Fleksebla, nerompebla, plasta materialo
Eldonis: U.E.A. Prezo: 2,50 gld., 10 steloj
Aldonu 10 % por sendkostoj

Mendu tuj ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando. Poŝtkonto 378964

LA NAŬZO



222 p.
15 × 21

broŝ.
11,70 gld.
46,80 st.

Eksterordinara romano de
Jean-Paul Sartre
en traduko de Roger Bernard

Serio ORIENTO-OKCIDENTO n-ro 3
Eldono de UEA